



PALACO PIACENTINI

Strato de la Konsulejo, 12
"Alta Vilaĝo"
63074 San Benedetto del Tronto
Tel +39 735 585352
E-mail: musei@comunesbt.it

Pinakoteko de la maro

Vintra horaro

Vendrede, sabate kaj dimanĉe: 10-13 h kaj 15.30-18,30 h; alitage, laŭpete, por lernejoj aŭ grupaj vizitoj.

Somera horaro

De 15/06 ĝis 15/09 ĉiutage 18-24 h.

Lunde fermita.

Historia Urba Arkivo kaj Studejo de Biĉe

Merkrede (nefeste) 09-13 h.

Vendrede (nefeste) 10-12 h, laŭpete, por grupaj vizitoj.

Ankaŭ en aliaj tagoj por lernantoj de elementaj kaj mezlernejoj.

Lunde fermita.

Salono de la Poezio

Por kulturaj aranĝoj, libroprezentoj kaj por civilaj geedziĝoj, tel. 0735 794 588.

Informoj

Tel. +39 735 794588/596

cultura@comunesbt.it - musei@comunesbt.it - www.comunesbt.it

Pro helpo kaj kunlaboro, la organizantoj de la
66-a Internacia Kongreso de la Esperantistaj Fervojistoj
estas dankaj al:

Regiono *Marche*

Provinco *Ascoli Piceno*

Komunumo *San Benedetto del Tronto*

Muzeoj *San Benedetto del Tronto*

Historia Arkivo *San Benedetto del Tronto*

Komerca Konfederacio (*Confcommercio*) *San Benedetto del Tronto*

Hotelo *Calabresi San Benedetto del Tronto*

Centro I.A.T. *San Benedetto del Tronto*

DLF (Postlabora Fervojista Organizo) *San Benedetto del Tronto*



hejme ĉe Biĉe



Palaco Piacentini sur historia bildo

Gvidkajero por rapida vizito
de Palaco Piacentini



Kiam oni diras, ke *San Benedetto del Tronto* “havas sian radikojn en la civilizacio de la maro” certe oni volas evidenti, ke la evoluado de la urbo ĉiam estis ligita al la mara elemento, kiu kondiĉis la ekonomian kreskon, la disvastigon de la urba strukturo, la rezultantan ŝanĝon de la demografiaj karakterizoj.

Sed tiu esprimo diras ion pli: la maro, niaj maroj, ĉiam influis la sociajn rilatojn, ĝi formis la karakterojn de la homoj, ĝi ĉiam ĉeestis en la bono kaj en la malbono, en la vivo de la familioj.

Kaj eĉ hodiaŭ diversaj anguloj de San Benedetto, de la monumentoj al la domoj en la malnova urboparto, de la haveno al la merkatoj, ĝis la vigla turisma areo, daŭre parolas pri la maro, kiel esenca elemento de ties ekzistado: tio estas malnova rakonto, periode ĝisdatigita, sed neniam ĉesanta.

Palaco Piacentini, kun la studejeto de la "mastrino de la domo", kun la Historiaj Arkivoj de la urbo, la Artgalerio de la maro, la Salono de la Poezio, precipe celas esti tio ĉi: la loko, kie la pasinteco revenas al la nuno, kie fariĝas videbla, en la dokumentoj, en la arkivaj paperoj, en la pentraĵoj kaj foto, la antikva sed moderna kaj poezia korusa rakonto pri la urbo, pri ĝia antikva akceptkapablo kaj pri ĝia interrilato kun la mara elemento.

Palaco Piacentini, lokita en la praa “vilaĝo” de San Benedetto, estas eleganta domo, en kiu vivis virino de vasta kulturo kaj kun senfina amo por la urbo, kiel Bice Piacentini: hejmo, do, forte simbola por gastigi ĉi tiun ekscitan memoran vojaĝon, kiu transdonas al ni la motivojn de nia historio kaj helpas al ni malkovri kaj kompreni, kiuj ni estas kaj al la gastoj malkovri la grandan koron de tiu ĉi urbo.

La Skabeno pri Kulturo
Margherita Sorge

La Urbestro
Giovanni Gaspari

-o-0-o-

Tiu ĉi kajero, eldonita okaze de la 66-a Kongreso de IFEF (Internacia Fervoja Esperanto-Federacio), organizita de IFEA (Itala Fervoja Esperanto-Asocio), estis adaptita el samnoma eldono, zorge de Giuseppe Merlini, kun testoj de Piernicola Cocchiario, Giuseppe Merlini, Stefano Novelli, Benedetta Trevisani, fotoj de Alessandra Brancaccio, Piernicola Cocchiario, Maurizio Gabrielli, Fabrizio Mariani, Andrea Moro, Stefano Novelli, Quinto Oddi, Franco Tozzi, Eldonejo Fast Edit, Novembro 2013.

Tradukis kaj editoris ĝin, proprainiciate, ame kaj danke pro la kortuŝa gastameco de la Urbo San Benedetto, Romano Bolognesi, Honora Prezidanto de IFEF, kiu kore gratulas al la aŭtoro kun la kunagantoj kaj dankas al ĉiuj, kiuj kontribuis por la bona sukceso de tiu ĉi iniciativo kaj kunlaboris en la tuta manifestacio.

Bologna, Majo 2014.

La tunelo sub Palaco Piacentini montras sian volbon, laborita laŭ saka tekniko, el betono kaj el brikoj (kun multaj partoj de amforoj) kaj estas nekutima la ĉeeston sur ambaŭ flankoj de linio da amforaj koloj, kiu viciĝas regule kaj paralele al la planko, proksimume je 1,50 m de la planko mem (ĉe la komenco de la volbo).

Dum la jaroj 2010-2011, kiel rezulto de mezuroj por ripari la vojan surfacon kaj la sub-surfacojn el la "Alta Vilaĝo", oni trovis interesajn arkeologiajn restaĵojn de romia vilao.

Tiuj ĉi elfosaĵoj konkludigas, ke oni devas nedisputeble antaŭdatigi la historion de la fiŝista vilaĝo kaj de la nuntempa urbo.



Vidaĵo de San Benedetto del Tronto - Dua duono de la XIX jarcento





Salono de la Poezio kaj la reto de subteraj koridoroj

La "Salono de la Poezio", en la kelo de la Palazzo Piacentini, estas aranĝita por gastigi kulturajn eventojn kaj estas ankaŭ disponebla por civilaj geedziĝoj. En la kelo malfermiĝas ankaŭ tunelo, datita je la fruaj jaroj de la 1-a jc. p.K., nun trairebla ĉirkaŭ 30 m, kiu origine eble estis kunligita al la tuta subtera reto, kiu trairas sub la "Alta Vilaĝo".



Enirtruo de la subtera koridoro



En la XIX jc, ĉi tiu pasejo estis, iel, pristudata de kleraj vilaĝanaj sinjoroj.

La markizo de Ripatransone Bruti-Liberati skribis: (...) ĉi tiu estas subtera vojo ĝuste sub la pordo de la kastelo, kie ekzistis turo, kiel vojo arte laborita kun multaj terkotaj tuboj kaj flukanaloj, kiu ŝajnas konduki al la fortikaĵo, ĉar ne la tuta vojo estas trairebla, sed parte ostrukiita per argilo kaj forjetaĵoj ... En alia pasejo estas nerafinita mozaika planko, nigra kaj blanka kun simplaj frisoj, kiuj ne estis malkovritaj ĉar ili enpenetras la flankon de la roko sub la grandaj domoj Neroni (...).



Dekoracioj per anfora koloj

Eĉ hodiaŭ, kelkaj koridoroj, tuneloj kaj kavernoj trairas la tutan kelon de la kastela distrikto: la tuta areo de la antikva vilaĝo, tiu inter la Strato Marinuccia norde, Strato Bastioni oriente, Strato Fileni sude, Stratoj Fileni kaj Case Nuove okcidente (tuta areo je 4 hektaroj), estis farita regula esplorado sub la voja surfaco kun datenalprenoj altimetriaĵ, geoteknikaj, geofizikaj kaj speleologiaj, kiuj konfirmis la ĉeeston de kavernoj kaj kavoj.

Ne ĉiuj tuneloj tamen estis fositaj samperio-de: la plimulto el ili, laŭ freŝa taksado, estis farita inter la XIII kaj la XIV jc., sed aliaj koridoroj estis fositaj dum malsamaj tempoj eĉ ĝis malfrue en la XIX jc.

hejme ĉe Biĉe



Palaco Piacentini (jam Domo Fiorani)

Dum longa tempo ĝi estis la hejmo de Beatrice Piacentini-Rinaldi, dialekta poetino, kiu havis la meriton doni al la lingvo de San Benedetto la dignon de literatura lingvo. Hodiaŭ Palazzo Piacentini estas loko dediĉita al la Kulturo: nin bonvenigas la studejo de Bice, la Urba Historia Arkivo, la Artgalerio pri la maro kaj la Salono de la Poezio.

La plej malnova parto de la konstruaĵo, kiu estis starigita de Giuseppe Fiorani, majstro ĉarpentisto devenanta el Ripatransone, datiĝas 1812.

Ĉirkaŭ la dua duono de la XIX jc. la Fioranoj, avidaj montri sian socian supreniron provis certigi siajn prestiĝon donante ĉarman aspekton al la konstruaĵo, kian hodiaŭ ĝi reakiris.

Ĝia rektangula plano, disvastiĝas sur tri niveloj: la teretaĝo, kiu malfermiĝas ĉe strato Konsulejo, la unua etaĝo kun freskoj de la XIX jc. kaj la subtera kelo, kiu konsistas el serio da volbaj plafonoj.




Anastasio Fiorani

La surstrata fasado, kiu

najbaras ĉe la malnova "Pordo al la Maro" de la Kastelo, aspektas kiel origine: rafinitan sencon de viveco kaj leĝereco oni spiras el la rozruĝaj koloroj de la brikoj, kaj el la blankaj frontospacoj de la supra etaĝo.

Maldikaj plataj brikaj duonpilastroj dispartigas la murajn dekoraciojn per egalampleksaj kvadratoj, centre de kiuj malfermiĝas la ortangulaj fenestroj.



Mons. Luigi Fiorani



Palaca enirejo



kaj rigardo el la "Mara Pordo"




La ne alte taksata dialekto de San Benedetto atingis artan dignon en la ne pereontaj versoj de Bice Piacentini-Rinaldi ...

En 1857, okaze de la promulgacio de la dogmo pri la senmakula Koncipiĝo, en 1854 fare de la Papo Pio IX, kontraŭ la opinio de la loka juĝistaro, sed favorigitaj pro la apogo de la Centra Pontifika Registaro (Monsinjoro Luigi Fiorani estis hejma prelado de la papo), la Fioranoj volis konstrui por si aeran arkon, kiu ekde ilia hejmo (oficiala sidejo de la vic-konsulejo de Hispanio, ofico tenata de Anastasio Fiorani, jam komunuma prioro), leviĝanta super *Strato de la Koĉeroj* (nun Strato E. Fileni), kuniĝis al nove fabrikita domo sud-okcidente kompare al la ĉefa domo. Nature ni aludas pri la fama "Arko Fiorani", kiu estis eksplodigita de la germana armeo en 1944, por helpi la retiriĝon de siaj trupoj

dum la Dua Monda Milito, tiel obstrukcianta la komencan parton de la nura penetra vojo al la landinterno.



La Arko de la Senmakula Koncipiĝo nomata "Fiorani"



La retrovita fotoalbumo de De Carolis

Retrovitaj veloj

En 2008, s-ino Antonietta Anelli malkovris en tirkesto de malnova ŝranko fotoalbumon kun fotoj rilatantaj al la maristaro de San Benedetto, datita je la fino de la XIX jc. kaj komence de la XX. Ekzameninte, studinte kaj dissvastigante ĝin oni konkludis, ke temis pri bildoj de la pentristo Adolfo De Carolis.



Iama marista vivo



La malnova fotoalbumo, kun kartona kovrilo tegita per vinruĝkolora ŝtofo kun presitaj nigraj frisoj, enhavas 54 bildojn. La fotoj, grandparte en meza kaj malgranda formato, mezuras 8,5 x 10,5 kaj 7,5 x 7 cm. Ili montras trolbarkojn, lancoboatojn, boatetojn, maristojn kaj infanojn, tiel redonante plian prikskribon de nia mara historio. Dank' al la malavareco de la familio Anelli, la fotoalbumo estas nun je dispono en la Komunuma Pinakoteko pro donaco al la kultura heredaĵo de la urbo.



Armando Marchegiani, marborda etoso kaj bildoj de la urbo

Armando Marchegiani (San Benedetto del Tronto 1902-Romo 1987) estas la plej elstara pentristo, kiun naskis San Benedetto, ne nur pro sia biografio plena de ekspozicioj, premioj kaj gravaj verkoj, sed por lia kapablo interpreti, de la urbo kaj ĝia mondo, la kortuŝan ĉarmon de la pejzaĝoj, ĉefe maraj, la antikva beleco de la maljunaj maristoj.

Kiel okazis por Châtelain kaj Landi, kun kiuj li havis aktivajn kontaktojn, kaj De Carolis.



Armando Marchegiani

Poste li ricevis, en 1925, la Premion Pellegrini, organizita de la Akademio de Sankta Luko; en 1927 li estis en la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, kiel helpanto de la pastro pentristo Luigi Sciocchetti en la freska dekoracio de la preĝejo de "Sankta Jozefo de la irlandanoj" en Sankta Josè en Kalifornio, kaj en tiu de la portugalaj Salesianoj en Oakland, kie li engaĝiĝis en la "*Geedziĝo de la Virgulino*".

En 1929 li revenis al Italio kaj loĝis en Romo, kie verŝajne li al revidis Landi-n, kaj li pentris la "*Batalo de Amba Aradam*"-n, videbla en la salonoj de Palaco Barberini.

En 1937 li ekspoziciis en Hago, en la reĝa galerio Kley Kamp, unu el liaj ĉefverkoj, la "*Mirakla fiŝkaptado*"-n, kiu restis ĉiam en lia posedo. Li ne preterlasis la akademian kareiron, de 1933 ĝis 1943 okupis la postenojn de



Salono Marchegiani

vicdirektoro de la Akademio pri Nudo, Sindikato pri Belartoj; li partoprenis, ĉiam en 1943, en la Ĉiukvariara Kapitulo en Romo.

En 1965, la Komerca Ĉambro de Ascoli Piceno, sekve de nacia konkurso, konfidis al li imponan kaj ne facilan taskon: reprezenti la aktivecojn de la provinco en panelo kun formato 10 x 3,50 m. La verko, konceptita kiel esencaj kadroj de dokumenta filmo, donas kontinuan kaj atentokaptan vidon de la reprezentaĵo.

El liaj pentraĵoj, ĉu portretoj, ĉu landaj aŭ maraj perspektivaĵoj, filtriĝas ia emocia transporto, profunda kaj agrabla priskribeco, ne senigita de imagivo, ŝarĝita de tiu humaneco, kiu ĉiam trapentras ilin. "*Necesas doni lumon al la ombroj*", li diris, la ombroj de liaj pentraĵoj havas, fakte, intiman lumon. La "Premio Truentum", la plej alta agnosko, atribuita al li de la Urbo San Benedetto en 1986 pro sia arta agado, kronis lian laboreman ekziston.



Beatrice Piacentini-Rinaldi

Beatrice Piacentini-Rinaldi, alinomata Biĉe, naskiĝis en San Benedetto del Tronto la 21-an de Aŭgusto 1856 de la advokato Aŭgusto, mastro, kun lia patro, de advokata firmao en Romo, kaj de Marianna Fiorani el San Benedetto, filino de Anastasio Fiorani (urba prioro de San Benedetto kaj Vic-konsulo de Hispanio, Parma kaj Piacenza). Ŝi pasigis sian infanaĝajn jarojn inter Romo kaj San Benedetto del Tronto; ŝi vivis ankaŭ en *Collecchio* (Rieti), la origina lando de la familio Piacentini,

en la renesanca palaco konstruita laŭ la desegnoj de Antonio el Sangallo la Juna.

Ĝuste en Collecchio ŝi enamiĝis al la junulo, kiu poste iĝos ŝia edzo. Do, ŝi edziniĝis, post amaraj familiaj kvereloj, kun la pli juna frato de sia patro, kun la onklo Carlo, apenaŭ je kvar jaroj pli aĝa ol ŝi. El la kuniĝo naskiĝis en 1881 nur unu filo: Giuseppe, en Romo kiu tie mortis en 1935.

Sed la morto de la filo ne estis la nura doloro, kiun ŝi devis elteni: eĉ tre juna, en 1869 ŝi perdis sian patron; en 1881, la amatan fraton Walter (arkitekto, kiu projektis la novan monumentaran tombejon de Sankta Benedetto), en 1911 la edzon kaj en 1912 ŝian fraton Erneston (pentristo kaj fotisto).

Ĉirkaŭ la fruaj jaroj de la XX jc. ŝi decidis prizorgi pri Pia Ceccarelli (poste edzino Scaramazza), filino de maristo, Alvise Filippo Ceccarelli, kiuj vivis en strato Firenze, en modesta domo ne malproksime de la domo Fiorani. La kompanio de la eta Pia forlogis ŝin el la familiaj funebroj dum ŝi komencis la verkadon de la unuaj sonetoj en la dialekto de San Benedetto (dediĉitaj al la memoro de sia frato Walter), eldonante ilin en pluraj okazoj inter 1904 kaj 1926.



En 1905 ŝi estis premiita okaze de la Regiona Ekspozicio en Macerata kaj ŝiaj teatraĵoj komencis esti sukcesaj. Ŝiaj verkoj unue aperis en gazetoj kaj revuoj, kaj ŝia plej lasta eldonaĵo estis "Sonetti Marchigiani" (Markiaj Sonetoj) dediĉita al la memoro de sia amata patrino Marianna, kiu mortis en 1921.

(...) *Pri la urbeto, kiu ŝajnas al mi la plej bela, kies dialekto, kiun al aliaj povas ŝajni barbara, ĝi havas por mi tian ĉarman nostalgian dolĉecon de memoroj, mi provis portreti sentojn, aspektojn, kutimojn, plukante de la voĉoj, kaj, prefere, el virinaj lipoj, kelkajn el la plej naivaj esprimoj de la populara spirito* (...).

Jen kion ŝi skribis en la antaŭparolo de la libro "Poesia Vernacola Sambenedettese" (Poezio en la loka lingvo).

Ŝi pasigis la lastajn jarojn de sia vivo en la amata patrujo kaj mortis en San Benedetto del Tronto en la domo "Fiorani" la 18-an de Majo je la aĝo de 85 jaroj.



Marianna Fiorani Piacentini-Rinaldi



Gualtiero (Walter) Piacentini-Rinaldi



Tamburino de Bice pentrita de la edzo

La studejo de Biĉe

La 18-an de Majo 2002, datreveno de la morto de la poetino, estis inaŭgurita la salono dediĉita al ŝi, kiu, por tie loĝigi la Pinakotekon de la Maro, estis iom malpligrandigita. Hodiaŭ, la "Studejeto de Biĉe", krom la antikvan meblaron, elmontras ankaŭ la librojn, kiuj apartenis al la poetino



Angelo Landi, *Ŝtormo aŭ atendado*



Angelo Landi



Markalmo aŭ Atendado kaj retoj etenditaj por sekiĝo

Landi sentas la alvokon de pentraĵa klimato de moderneco, sed ne lasas sin sorĉi de la sirenaj de iuj kritikoj. Por li estas pli forta la allogo de la harmonio de nekoruptitaj lokoj, la ĉarmo de la homa figuro, de ĝia sankteco, kiel por Châtelain kaj De Carolis.

La realeco fariĝas alegorio de si mem, en la konstanta serĉo de la esenco de la vero, kiun la lumo reliefigas kaj evidentigas sen la helpo de ombroj; ĝi vivas per si mem, ĉar ĝi estas imanenta en la koloro praamaniere.

De la lombardia klarismo, kiu markas liajn unuajn verkojn, li alvenas al kolorismo tipe venetia, sed la koloroj vibras kiel en la impresa pentrarto.


En la du pentraĵoj faritaj en San Benedetto, "*Ŝtormo aŭ Atendado*", kaj "*Markalmo aŭ Atendado kaj etenditaj sekiĝantaj retoj*" 1913-18, la ĉefrolanto ĉiam estas la lumo, malvarma kaj ĉirkaŭanta en la unua, varma kaj trankviliga en la dua. Ekfulmita de la sublumo, kiel la romantikaj pentristoj, kiuj venis al Ita-

lio el norda Eŭropo, li majstre kombinas la realan vizion kaj lian internan memon.

Absoluta ĉefverko "*La sonĝo aŭ vizio de Sankta Dominiko*", pentrita sur 509 m² en la duobla kupolo de la Sanktejo-Baziliko de Pompejo, kun 327 figuroj kies staturato estas, averaĝe, proksimume 3 metra.

La mirinda kadenco de la koloroj, la talenta majstreco, per kiu li kombinis "planojn kaj volumojn", ebligis la kreon de elstara kaj escepta "figura arkitekturo", kiu ne havas komparon en la historio de la moderna arto, kaj tre malmultaj en tiu de la "baroka kaj renesanca."

"Ĉiu figuro havas animon, karakteron, ideon, simbolon, geston"; la tuto entenas pentran melodion, kiun Dante ne hezitus estimi. En tiu ĉi ĉefverko, kiun li donis al la arthistorio, li ŝajnas esti altirita de Correggio el Parma kaj admiras Giovanni Lanfranco kaj Tiepolo, sed li ne restas kondiĉita, li pentras per sia stilo kaj sekvante lian intuicion.



Adolfo De Carolis, *La lanĉo*



Adolfo De Carolis, *La rudro*



"terura" Mikelanĝelo kaj de Böcklin de "La Insulo de la Mortintoj".

Li komencis ornamati librojn por D'Annunzio kaj Pascoli kaj ekde 1903 li desegnis frisojn kaj verkis artikolojn por la revuo "Leonardo" fondita kun Papini kaj Prezzolini.

Inter la impetaj bildoj por *Francesca da Rimini* (1902), la kamparanaj por *La filino de Iorio* (1904), la lapidaraj de la *Nokturno* de la "Poeto" (1917-21), la gravuraĵoj pri la maro esprimas poeman aŭtonomion.

La jeto, la vinĉo, la rudro, la riverbuŝo, la tombaj monumentoj - lignogravuraĵoj verkitaj inter 1904 kaj 1908, dum en Eŭropo eksplodis la unuaj avangardaj fenomenoj - montras kontemplan lirismen kaptita en simbolisma stagnado, kiu karakterizas la italan situacion en la jarcenta komenco.

Sed preter la konvenciaj latentaj signifoj, la videblaj malfermas - kvankam aliĝante al la estetikaj fervoroj de japonismoj *fin-de-siècle* - etnografian temon, kiu laŭgrade fariĝas pli urĝa, celanta dokumenti la unikan heredaĵon, kiun la "nova samnivelega civilizo" estas pereiganta.

La apelacio de 1920 (La popola tradicia arto, en "La ŝtonjetilo" (La fionda", Romo) ricevas entuziasmajn respondojn stimulanse sentemojn, kiuj en 1923 kondukas al la starigo de la Reĝa Muzeo de la Itala Etnografio, e-kde 1956 al la Nacia Muzeo de Artoj kaj popolaj tradicioj.

La dekaŭ-jarcenta ekvacua idealo inter arta kaj socia engaĝiĝo trovas, laŭ De Carolis, ĉe la "marbordo" de San Benedetto del Tronto, ĉemanan ekvivalenton de la Tahitio de Paul Gauguin: kultura antropologia laboratorio kie, malgraŭ la progreso, klare elmerĝas el la profundoj "la voĉo de la aĵoj".

Angelo Landi, praa lumo trapenetrita de interneco

Angelo Landi (Salò 1879-1944). Kiam en la dua duono de la dudekaj jaroj, post pli mallongaj restadoj en la antaŭa jardeko, Angelo Landi decidis pasigi la somerajn feriojn en San Benedetto, pro probablaj indikoj de Armando Marchegiani, kiun li renkontis en Romo, la urbo estas en la plena splendo de ankoraŭ netuŝita beleco, aspegita per pura lumo.



kaj al ŝia familio, ŝiajn notojn kaj ŝian etan Arkivon.

La Biblioteko estas la rezulto de la donaco de la arkitekto Alberto Tavazzi el Romo, nepo de Giuseppe Piacentini Rinaldi, kiu volis ke ĉiuj libroj kun la Ex Libris: "Per ogni se-





Bice Piacentini-Rinaldi

te” (Por ĉies soifo), revenu al San Benedetto, kune kun la portretoj de la familio Fiorani kaj Piacentini Rinaldi.

La libroj donacitaj al la Urbo, multaj en la franca, iuj en la hispana kaj la aliaj en la itala, ĉiuj estas romanoj, komedioj kaj tragedioj datiĝantaj de la dua duono de la XIX jc. ĝis la frua XX.

Ne mankas libroserioj, la volumoj grandformataj, maloftaĵoj kaj libroj aŭtografiitaj de Biĉe. Aliaj libroj de la biblioteko, kiu origine konsistis el ĉirkaŭ 7.000 volumoj, multaj perdiĝis, kaj tiuj fakaj pri medicina estis donacitaj de la arkitekto Tavazzi al la Libera Universitato "Campus Bio-Medicina" en Romo.

Urba historia arkivo

La Urba Historia Arkivo entenas dokumentojn produktitaj aŭ akiritaj fare de la Urbo San Benedetto del Tronto (laŭ la nuna nomo donita al ĝi en 1862) dum sia ekzisto inter la 17-a ĝis la 20-a jc. (ĉirkaŭ 1970). La tuta dokumentaro, nature, estas je dispono por la civitanoj kaj kleruloj en komforta studĉambro por konsultado. Dum iuj periodoj ĝi suferis multajn damaĝojn: pro naturaj katastrofoj, kiuj detruis rarajn dokumentojn, sed ankaŭ pro neglektoj, arbitraj subtrahoj kaj malbonaj mediaj kondiĉoj, en kiuj ili estis longtempe konservataj. Tio rezultigis la perdon de antikvaj paperaĵoj. La plej malnovaj dokumentoj konservataj estas la "Katastro de la Komunumo de San Benedetto" el 1652 kaj poste la unua registro de la serio de konsiliaj protokoloj (1696-1710).



La salono-studejo en la Urba Arkivo

Alfred Châtelain, etno-pentristo kaj la fiŝkaptista civilizacio

Alfred Joseph Châtelain (Moutier, Svislando, 1867 - Nice, 1943), filo de riĉaj gepatroj, mastroj de pluraj generacioj de vitrajfabriko, kiuj komercis tra tuta Eŭropo, de tiu naskiĝo li ricevis la kondiĉojn, kiuj igis lin ekonomie memsufiĉa por serena arta elekto, kiu daŭris dum lia tuta vivo.

Post lernado en Besançon li havis la okazon studi en Parizo ĉe la Akademio de Julien kaj en la ateliero de Cormon: li estis atentema al la novaj impresionismaj fermentoj, al la disvastiĝo en Italio de la pejzaĝoj de la pentristoj "Makuletistoj" (Macchiaioli), al la granda okazo havi renkontojn, kiujn la kultura medio de Parizo proponis al li.

Laŭlonge de sia vivo li komplete ŝatis la historion de navigado kaj pri la evoluo de ŝipmodeloj, kiun li studis kaj desegnis senĉese, kiel montras liaj laborfolioj kaj liaj kajeroj. Kiel kelkaj el liaj samtempuloj kun forta arta sentemo, li disvolvis kulton por vojaĝoj kiel arto de renkontiĝo, preferante mediteraneajn lokojn, en kiu la malkovro de la maro kaj ĝia sennombraj vizaĝoj estis la unua kialo de la elektoj: Alĝerio, Maroko, Sicilio, ĝis la alveno al la plaĝo de San Benedetto, kie li havis la okazon kombini antropologiajn esplorojn kaj observadon de la mara pejzaĝo.

Tio montriĝas en la vario de la temoj de liaj pentraĵoj kaj en la detala rekonstruo de scenoj pri surteraj kaj navigadaj laboroj.

Lia restado en San Benedetto (1908-1920) estis decida momento en lia arta evoluado kaj en lia plena konsciigo per etno-antropologia alproksimiĝo al maristoj, kiu moviĝas inter fotografia post-verismo kiel en Verga (tiel

diritaj tranĉaĵoj de vivanta vivo) kaj luminita eksperimentalismo, kiu aplikas al la riĉeco de vidaj signaloj, kiujn la tipo kaj la simboloj de veloj havigis al li.

Ĉiu liaj verkoj estas la rezulto de atenta esplorado kiu implicas la uzon de la novaj fotiloj kaj de la ĉiutaga dialogo kun fiŝkaptistoj, kiujn li rigardis kun la sama atento, per kiu iuj verkistoj de la frua jarcento igis realajn ĉefrolulojn de eble pli fama literatura epopo.

Tiu ekspozicio tiel granda kaj ampleksa, nun eblas danke al la donaco farita de la familio en 1967 al la urbo; ĝi rimarkas la grandan personecon de tiu artisto "la plej sanbeneditana inter tiuj, kiuj ne naskiĝis sed loĝis en la urbo" (Caselli 1989), kiu, kiam oni demandis kial li pentris marajn scenojn, li kutimis respondi: "Mi devas pentri ĉion, kion mi vidas, ĉar ili estas bildoj, kiu baldaŭ malaperos."

Foririntaj al Nice, la Châtelain fariĝis hotelistoj sur la franca Riviero. Alfred preferis vidi aliloke la efektivigojn, kiuj la novaj turismaj alvokiĝoj havos sur la marborda pejzaĝo.

Adolfo de Carolis, la eterna kaj alternanta maro

"La eterna kaj alternanta maro" kaj la sentempaj laboroj de la piĉenaj fiŝistoj kaj virinoj proponis sugestojn al Adolfo De Carolis (Montefiore Aso 1874 - Romo 1928), ĉirkaŭ la fino de la jarcento, por fotoj, desegnaĵoj, gravuraĵoj, pentraĵoj kaj muraloj, artikoloj kaj lirika prozoj.

Post la aliĝo al la grupo "In arte Libertas" en 1896 en Romo, kreita de la pentrista pejzaĝisto Nino Costa, ekde 1901 li instruis ornaman desegnon ĉe la Akademio en la Florenco de la renesancaj majstroj, tiu de la



Alfred Châtelain



Bice Piacentini-Rinaldi



Adolfo De Carolis



Dekoracio en la Arkivo




La centro de la plafono

Ĉi tiu registro, perdita dum la aera bombado la 15-an de Marto 1944, estis retrovita hazarde en 1955, inter amaso da rubaĵoj, fare de submastra masonisto. Inter la aldonitaj fondusoj troviĝas: la Arkivo de la Mutuala Laborista Societo pri Reciproka Helpe (Società Operaia di Mutuo Soccorso), la Arkivo de la Aŭtonoma Turisma kaj Kuracada Entrepreno (Azienda Autonoma di Turismo e Cura), la Arkivo de ECA t.e. Komunuma Asista Organizo (antaŭe Kongregacio de Karitato), la Arkivo (kun biblioteko) de la familio Piacentini-Rinaldi kaj aliaj. La Historia Arkivo estas ankaŭ disponebla por la stokado de t.n. "privataj aŭ familiaj arkivoj".



Klipo de la Registro



Reĝa Dekreto de aprobo por la nova nomo de la urbo: San Benedetto del Tronto



La unua bandomo estis konstruita en 1865 de Filippo Leti



Projekto de la marborda promenejo inaŭgurita en 1932 laŭ desegnoj de Onorati.



Pinakoteko de la maro


La Pinakoteko de la maro - malfermita en aprilo 2009 - kvankam lokita en la koro de la malnova vilaĝo, estas parto de la kompleksa muzeo dediĉita al la temo maro, kiun la urba konsilantaro starigis ĉe la Fiŝmerkato (Fiŝmuzeo - Muzeo de amforoj - Muzeo de la marista civilizo de Markio - Antiquarium Truentinum). La Pinakoteko estas perfekta loko por unuece konatigi la riĉan artan produktadon de la urba kolekto, montrante verkojn ĝis nun konservitaj en urbaj deponejoj aŭ en publikaj oficejoj.

La ekspozicia sekcio pli granda kaj pli valoro certe rilatas al la produktado de pentraĵoj, fo-

"Registro de subskriboj" el 1932, kun la ovalo, kiun la pentristo Marchegiani skizis kaj unu el la 4 klipoj gravuritaj per vido de la marperspektivo.



Palaco Piacentini (maldekstre), la familia domo Massetti, la arko de La Senmacula Koncipiĝo kaj la nova domo Fiorani (dekstre)



Alfred Châtelain, Nokto

toj kaj desegnaĵoj de la Sviso Alfred Châtelain, sekvata en graveco de tiu de Adolfo De Carolis, aŭtoro de nacia prestiĝo, sentkapabla kapti la aspektojn de la ĉiutaga vivo kaj de la piĉenaj maraj vidaĵoj kaj, inter la modernaj verkistoj, la bildojn de Armando Marchegiani el San Benedetto, kiu ĉeestas en la kolekto per oleaj pentraĵoj kaj surpaperaj desegnaĵoj. En la ĉambro apud la enirejo nuntempe estas ankaŭ du pentraĵoj de Angelo Landi, apartenantaj al privata kolekto.

Lastatempe, la sekcio estis riĉigita per fotoj de la albumo "Retrovitaj veloj" (Vele ritrovate), atribuita al De Carolis, donacita al la urbo de Antonietta kaj Gigi Anelli.



Alfred Châtelain, Sinjorino sur la strando



Skizoj pri papiliaj flugiloj aŭ veloj pentritaj